

Jukka Pietiläinen

## **Plurlingvismo kaj Esperanto: Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado**

### **Resumo**

La prilingva ideologio de la Esperanto-movado aŭ tiu de Universala Esperanto-Asocio ŝanĝiĝis ekde la 1960-aj jaroj. La malnova idearo emfazis “la lingvan problemon”, kiu estis komprenata unuavice kiel manko de interkompreno pro diverslingveco, kaj kiu opiniis la plurecon de lingvoj la ĉefa kialo de tiu lingva problemo. Sekvante la aktiviĝon de etnaj politikaj movadoj ekster la Esperanto-movado la tradicia ideologio estis modifita en la 1970-aj jaroj kaj la nova idearo ricevis sian kulminon en la Manifesto de Prago en 1995. Ankaŭ la fortiĝanta pozicio de la angla lingvo estis unu el la kialoj por tio, ke necesis reformi la malnovan lingvan politikon, laŭ kiu neniu nacia lingvo povas esti ĝenerale akceptata. Humphrey Tonkin ludis gravan rolon en la formiĝo de la nova lingva politiko de Universala Esperanto-Asocio.

### **1 Persona antaŭrimarko**

Mi mem aliĝis al la Esperanto-movado kaj ĝia lingva komunumo meze de la 1980-aj jaroj (kadre de elementa kurso, aŭtune 1983), unuavice pro ideaj kialoj. Antaŭ la eklernado kaj dum la unuaj jaroj de lernado de Esperanto mi informiĝis pri la ideoj por reformi la mondon kiel la Nova Monda Ekonomia Ordo aŭ Nova Monda Informa kaj Komunika Ordo (NMIKO). Mi komencis studi ĵurnalistikon en 1985 en la universitato de Tampere en fakultato, kie unu el la profesoroj estis inter la fortaj subtenantoj de NMIKO. Kvazaŭ laŭ la spirito de la epoko, mi nature ligis mian novan intereson al Esperanto kun tiuj ideoj pri reformado de la mondo kaj trovis similajn ideojn en la Esperanto-movado. Tamen, tiam mi ne sciis, ke tiuj fenomenoj estis relative novaj en la Esperanta movado, sed ĝuste tial mi trovis Esperanton subteninda ideo.

### **2 La interkomunika problemo laŭ Zamenhof ĝis Lapenna**

La rilato inter Esperanto kaj aliaj lingvoj forte ŝanĝiĝis dum la historio de la Esperanto-movado. Ne temas unuavice pri rilato lingva, sed pri rilato idea aŭ ideologia. Unuavice temas pri tio, ke la idea loko de Esperanto inter la lingvoj ŝanĝiĝis kaj esperantistoj komencis vidi la estontan utopian venkon de Esperanto en alia maniero ol antaŭe.

En la komenca epoko de la lingvo Esperanto aperis unuavice kiel ilo por transiri lingvajn barojn, kiuj aspektis nesupereblaj. Apud tiu celo Zamenhof strebis al la unuigo de la homaro, kaj li ne vidis ion aparte negativan en tio, se en fora estonteco naciaj lingvoj malaperus. Eĉ pli, en 1910 li firme emfazis: “La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos en la homaro nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion” (Zamenhof 2006, 195). Li

tamen opiniis, ke tiu celo estas por malproksima estonteco kaj praktike necesa estus nur, ke malaperu altrudado de naciaj lingvoj de unu gento al alia, ke “konservinte sian gentan lingvon kaj gentan religion en la interna vivo de sia lingva aŭ religia grupo, la homoj por ĉiuj rilatoj intergentaj uzu lingvon neŭtrale-homan [...]” (Zamenhof 2006, 196).

Surbaze de la idealo de Zamenhof, ke la naciaj lingvoj iom post iom malaperu, formiĝis ankaŭ la ideologia koncepto, kiu nomiĝas sennaciismo. En ĝi la idealo pri Esperanto kiel la ĉefa lingvo havas sian plej klaran manifestiĝon: sennaciistoj volas, ke Esperanto estu por ili sia “ĉefa lingvo kaj la naciajn lingvojn ili rigardas nur kiel helpajn” (Lanti 1970, 38). La influo de sennaciismo estis forta en la laborista Esperanto-movado, sed ankaŭ en la neŭtrala movado la ideo pri Esperanto kiel la sola internacia lingvo (tamen sen ideo pri forigo de naciaj lingvoj) havis fortan pozicion. Kritikantoj de Esperanto povis opinii Esperanton malamiko de naciaj lingvoj, eĉ se temus nur pri ilia internacia rolo.

En la neŭtrala Esperanto-movado unu el la ĉefaj porparolantoj de Esperanto kiel la estonta sola internacia lingvo sendube estis Ivo Lapenna. La idea fluo ĉirkaŭ li manifestiĝas en la ĉefe de li redaktita verko “Esperanto en Perspektivo”. Laŭ ĝi akcepto de unusola nacia lingvo “montriĝis tute nereala”, ĉar “la grandaj nacioj ne estas pretaj cedi la akiritajn poziciojn de siaj lingvoj, kaj, eĉ pli, ke aliaj ĉiam pli postulas la saman pozicion por siaj respektivaj lingvoj”. Krome la lernado de naciaj lingvoj ne taŭgas kiel solvo ĉar, “eĉ la plej modernaj instrumentoj donas nur tre modestajn rezultojn” kaj se iam eblis koncentriĝi al lernado de la latina aŭ nur de la franca, “hodiaŭ oni devus lerni tutan aron da aliaj lingvoj”. La menciita paragrafo tamen atentigas ankaŭ pri etnaj minoritatoj kaj malgrandaj nacioj, kiuj “aŭdigas siajn voĉojn por protekti siajn naciajn identecojn” (Lapenna 1974, 24-26).

Kutimis ankaŭ atentigi pri altaj kostoj de multlingveco, evidentaj mistradukoj, kiuj rezultas, se pluraj lingvoj estas uzataj, kaj malaltigo de intelekta nivelo de internaciaj renkontiĝoj pro tio, ke eblas elekti kiel reprezentantojn “ne la plej bonajn, sed tiujn, kiuj scias, almenaŭ modeste, la koncernajn oficialajn lingvojn” (Lapenna 1974, 18).

Tamen al tiu idea fluo apartenas ankaŭ la ideo pri egalrajteco, sed en relative limigita formo. Unuavice temas pri ĝeniĝo paroli en fremda lingvo, kiu en internaciaj konferencoj donas avantaĝon al tiuj, kiuj povas uzi sian gepatran lingvon aŭ plene regas la oficialajn lingvojn. Due, temas pri tio, ke nacioj, kies lingvoj estas oficialaj en internacia nivelo, “akiras konsiderindajn avantaĝojn kompare kun nacioj, kies lingvoj ne estas oficialaj”, el kio sekvas lukto ĉirkaŭ la lingvoj. (Lapenna 1974, 19-20)

La trarigardo de la revuo Esperanto, la ĉefa ideologia organo de la neŭtrala movado, plu spegulas la lingvopolitikan ideologion ene kaj apud Universala Esperanto-Asocio en tiu tempo. En komenco de la 1970-aj jaroj la mencioj pri “lingva problemo” en la revuo Esperanto atentigis pri kostoj de plurlingveco kaj pri tio, ke ĝi estas unu el la urĝaj problemoj de la homaro: “la industria mondo fakte elspezas neniom por solvi aŭ eĉ faciligi la urĝan problemon de la plurlingveco” (Esperanto, decembro 1972, 204). Ankaŭ teknikaj solvoj ricevis mallaŭdon. Ekzemple raporto pri la Eŭropa Junulara Konferenco pri Sekureco atentigis pri “kaprica interpreta aparataro” kiel maltaŭga solvo (Esperanto, oktobro 1972, 172-173) kaj alia artikolo atentigis pri kreskego de traduklaboro (Esperanto, junio 1970, 90-91). La revuo enhavis ankaŭ informojn pri la akcidentoj, kiujn parte kaŭzis la lingva problemo (Esperanto, decembro 1970, 187; Esperanto, oktobro 1971, 163). Nekompreno lingva estis ankaŭ inter mencioj pri la lingva problemo: La revuo citas novaĵon de Reuter, laŭ

kiu marlimaj konfliktoj inter Usono kaj Sovetio solviĝis malpli facile “ĉar neniu parolas la lingvon de la alia” kaj komentas ke “jen bona aŭguro por komunaj kosmovojaĝoj rus-usonaj!” (Esperanto, marto 1972, 49).

Aparte interesa estis reago de la revuo “Esperanto” al bojkoto de fremdaj lingvoj en Libio en 1970, kie reduktiĝis la instruado de fremdaj lingvoj. La bojkoto kreos lingvan vakuon en Libio, kiu finfine devas efiki favore al la ŝancoj de neŭtrala internacia lingvo (Esperanto, oktobro 1971, 162). La revuaj artikoloj ankaŭ emfazis, ke inter esperantistoj la lingva problemo estis “definitive solvita per Esperanto” (Esperanto, septembro 1972, 149).

Tamen aperis ankaŭ aliaj voĉoj. Brian D. Kaneen verkis artikolon “Dulingvismo kaj diskriminacio en Kanado”, en kiu li atentigis pri la fakta diskriminacio de la franca lingvo, malgraŭ oficila dulingveco (Esperanto, novembro 1972, 183-184). Aperis ankaŭ artikoloj pri lingva batalado en Pakistano kaj Kimrio (Esperanto, oktobro 1972, 162), aŭ ke lingva diskriminacio ne estas malpermesata en Britio (Esperanto, aprilo 1973, 62). Krome, jam tiam montriĝis klare, ke “la angla lingvo nun estas la sola alia kuranto krom Esperanto en la konkurso al internacia kompreniĝo” (Esperanto, julio-aŭgusto 1972, 124). La revuo ankaŭ raportis, ke internacia Esperanto-konferenco en Antverpeno, 29.4.-1.5.1972, faris firman elpaŝon kontraŭ lingva diskriminacio kaj konstatis, ke etnaj grupoj malhavas adekvatajn eblecojn de normala uzado de sia gepatra lingvo (Esperanto, junio 1972, 102). Do, la tradicia idearo komencis jam havi pli da vario, kvankam la ĉefa linio plu emfazis la multlingvecon kiel kialon de problemoj.

### **3 Ekesto de ideologia ŝanĝiĝo**

La ideologia ŝanĝiĝo komenciĝis en la 1960-aj jaroj kaj fariĝis pli videbla en la 1970-aj. Apud la “tradicia esperantisma ideologio” aperis ĝia modifo, aŭ tute nova ideologia koncepto, kiu pli emfazis egalrajtecon, utilon de plurlingveco, apartan valoron kaj konservindon, se ne evoluigon, de minoritataj lingvoj. La problemoj de multlingveco kaj “la lingva problemo” kiel tuteca koncepto komencis aperi malpli ofte.

Iusence komenca punkto estis la agado de TEJO kontraŭ lingva imperiismo, kies unu kulmino estis la Deklaracio de Tyresö en 1969. En ĝi TEJO esprimis sian starpunkton pri la lingva problemo jene:

Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacioj en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemo, kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato, ke oni ne sufiĉe atentis la detruadon de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj. Tiu detruado estas nenio alia ol instrumento de lingva imperiismo. (Tonkin 2006, 150)

Kvankam minoritataj lingvoj ne estas eksplicite menciataj en ĝi, la deklaracio de Tyresö atentigis pri la malsamrangeco de naciaj lingvoj kaj pri lingva imperiismo. Lingvoj ne estis aparte atentataj en neesperantistaj kontraŭimperiismaj debatoj de tiu epoko kaj tiel la aktiveco de TEJO tiuflanke bone reprezentis la ŝanĝiĝantan esperantistan starpunkton pri la rolo de lingvoj.

Unu el la gravaj paŝoj en la ideologia ŝanĝiĝo estis la apero de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) en 1978. IKEL kaj ĝia revuo Etnismo, komencita jam en 1972, celis kunlabori kun movadoj, kiuj defendas minoritatajn etnojn kaj ankaŭ konsciigi esperantistojn pri la defendado de minoritatoj. En la unua numero de Etnismo la afero estis difinita jene:

Luktado kontraŭ lingva diskriminacio neniel povas limiĝi al la ŝtataj lingvoj, sed ĝi devas, kondiĉe ke ĝi estas sincera, konsideri samtempe la ŝtatinterne malfavoratajn lingvojn de etnaj minoritatoj. (Etnismo n-ro 1, 10.05.1972)

Esperanto estis celita por uzado en ĉiuj interretaj rilatoj. Do, laŭ tiu difino la problemo de internacia lingvo ne temis nur pri la neeblo interkompreniĝi, sed pri egaleco sendepende de la gepatra lingvo. Ja en pluraj landoj la anoj de etnaj minoritatoj scipovas ankaŭ la ŝtatan lingvon. En tio estis principe nenio nova kompare al ideoj de Zamenhof kaj de fruaj esperantistoj esprimitaj en Deklaracio pri Esperantismo: ke neŭtrala internacia lingvo “povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo” (Privat 1927, 25). Tamen tia okupiĝo pri enlandaj lingvaj problemoj ne estis aparte emfazata en la ideologio, kiu regis en la postmilita UEA.

Tia pensado certe ekzistis jam pli frue, almenaŭ en iu formo. Ekzemple, en fonda kunveno de la Esperanto-klubo de Jyväskylä, la 21-an de marto en 1963, la esperantisto Eino Lehtonen, laŭ raporto, emfazis la gravecon de Esperanto ĝuste kiel protektanto de malgrandaj lingvoj de tiuj, kies lingvojn la grandaj popoloj emas sufoki. Pro ĝia rolo kiel nenies gepatra lingvo Esperanto ne subpremus kulturon de ajna popolo<sup>1</sup>. Tamen tio certe ne reprezentis la solan, kaj eble eĉ ne la ĉefan, idean fluon en la finlanda Esperanto-movado. Eĉ en la 1980-aj jaroj inter finlandaj esperantistoj ankoraŭ eblis aŭdi opiniojn, kiuj neglektis la lernadon de aliaj lingvoj ol Esperanto kaj opiniis la lingvan plurecon negativa fenomeno. Kutime tiajn opiniojn esprimis pli maljunaj esperantistoj, dum la pli junaj jam vidis la internacian lingvan situacion en alia maniero.

En Universala Esperanto-Asocio la ideologia ŝanĝo ricevis pli da forto, kiam okazis la ŝanĝo de la prezidanteco de Lapenna al Tonkin en la jaro 1974, kvankam tio certe ne estis kialo aŭ io drasta renovigo en la asocia politiko. En sia Hamburga parolado Lapenna vidis la nombran kreskon de lingvoj en internaciaj organizoj kiel indikilon pri tio, ke “la lingva problemo komplikiĝis kaj ĉiam pli komplikiĝas” kaj el tiu sakostrato la sola eliro estus akcepto de unu sola lingvo (Esperanto, septembro 1974, 146).

Tamen tiu ideo evoluo komencis jam ĉe Lapenna. Laŭ atesto de Tonkin “jam antaŭ 1974 Lapenna komencis iom diskrete levi ĉe Unesko kaj UN demandojn pri lingva diskriminacio kaj homaj rajtoj” kiuj post 1974 fariĝis “signifa parto de la argumenta strategio de UEA” (Tonkin 2006, 81).

Iusence la nova aliro al la lingva problemo estas videbla ankaŭ en raportoj de la revuo Esperanto, kiuj atentis malpli “la lingvan problemon” en pli frua senco, sed atentis pli la politikan dimension de ĝi. Tamen en 1974 kaj 1975 aperis ankaŭ multe da kontribuajtoj surbaze de la tradicia aliro al la lingva problemo: manko de komuna lingvo, plureco de lingvoj ktp.

---

<sup>1</sup> Laŭ raporto en la arkivo de la Esperanto-klubo de Jyväskylä.

En la revuo Esperanto aperis raportoj pri minoritataj lingvoj, lingva batalo en Belgio (marto 1975, 48), demando pri tio, ĉu la friula estas nomenda lingvo aŭ dialekto (novembro 1976, 183). Tamen laŭ la tradicia stilo la revuo Esperanto ankoraŭ atentigas pri problemoj de plurlingveco en Eŭropa Ekonomia Komunumo (januaro 1975, 3) kaj kritikas tion, ke lingva egalrajteco fariĝis aĉetebla varo (la aldono de la araba kiel labora lingvo en Unesko, marto 1975, 47).

Ankaŭ la nomŝanĝo de la ĉefa faka revuo pri lingvaj problemoj en 1976-77 de “La Monda Lingvo-Problemo” al “Language Problems and Language Planning” estis unu el indikiloj pri la ŝanĝita rilato al lingva(j) problemoj(j). Ne nur la ĉeftitolo ŝanĝiĝis de Esperanto al la angla, sed ankaŭ la lingva problemoj ne plu aperis kiel unu, sed en pluralo kaj estis ligita al lingva planado (Tonkin 2006, 37-38).

En kongresaj rezolucioj la ŝanĝoj estas malpli klare videblaj. En 1975 ankoraŭ aperis la ideo, ke “la ĉiam kreskanta problemoj de multlingveco grave bremsas liberiĝon kaj plivastiĝon de la kunlaboro celata de la konferenco” (= La Eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro) (Esperanto, septembro 1975, 145) kaj en 1976 la kongresa rezolucio emfazis la egalecon de lingvoj nur en inter-ŝtataj rilatoj “en la ĝusta kaj justa rilatado de la ŝtatoj” kaj proponis Esperanton “por oficiala utiligo en internaciaj organizoj” (Esperanto, septembro 1976, 141).

Tamen jam tiam Humphrey Tonkin emfazis en sia festparolado la pozitivan rolon de la angla “kiel konvinkitaj internaciistoj ni ĝojas, ke la diversaj nacioj interesiĝas pri la senpera komunikado de iliaj civitanoj kun tiuj de aliaj landoj, ni bedaŭras ke tio ne okazas en spirito de reciprokeco”. Tamen li menciis ankaŭ la enlandan trudadon de la propraj valoroj al aliaj kiel neakcepteblan, kiun lastatempe spertis loĝantoj de Soweto, kebekanoj kaj usonaj parolantoj de la hispana (Esperanto, septembro 1976, 144-145).

Laŭ la kongresa rezolucio de la Lucerna UK (1979) estis difinita erara la supozo, ke eblas trovi ekvilibron inter lingva egaleco kaj lingva unueco kaj ke tiu erara supozo povas konduki al politikaj rivalecoj, diskriminacio kaj superfluaĵoj. Esperanto aperis en tiu rezolucio kiel adekvata respondo, samtempe justa kaj praktika. La lingva problemoj ankaŭ plu aperis en singularo, kvankam eble malpli emfazite ol iam pli frue (Esperanto, septembro 1979, 147).

Tamen, kiel prave atentigas Michel DucGoninaz en la 1970-aj jaroj, la partopreno de la esperantistoj en la batalo kontraŭ lingva imperiismo, ne estis subtenata de ĉiuj tendencoj. Ĝi estas rifuzata “unuflanke de la soveta skolo, kiu asertas, ke lingvaj konfliktoj ne ekzistas, almenaŭ en la socialismaj ŝtatoj, kaj ke lingvoj naciaj, “internaciaj”, “interpopolaj”, “mondaj” kaj ankaŭ Esperanto povas pace kunekzisti” kaj aliflanke de subtenantoj de Manifesto de Raŭmo (DucGoninaz 1985, 40).

Tamen en la internacia nivelo la batalo kontraŭ la superrego de la angla (kaj evidente ankaŭ aliaj okcidentaj lingvoj) povis ricevi subtenon de esperantistoj ankaŭ el socialismaj landoj, se la reganta pozicio de la rusa ene de la socialisma bloko, aŭ eĉ pli ene de Sovetio mem, ne estis inkluzivita.

## 4 Ekster-esperanta evoluo kiel klariga faktoro

La ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado tamen ne okazis en vakuo. La tradicia Esperanta ideologio kun malmulta okupiĝo pri malapero de naciaj lingvoj bone kongruis kun la ĉefa ideologia linio de la tiutempa socio. Laŭ Allardt kaj Strack (1981) la ŝanĝo videblas ekzemple en la komparo de diversjaraj eldonoj de anglalingva Enciklopedio de Sociaj Sciencoj. En la eldono de 1931 aperis opinio, ke la evoluo kaŭzas malaperon de naciaj kaj kulturaj limoj; dum en 1968 troveblas la ideo, ke la nombro de etne diversaj socioj kreskas (Allardt & Strack 1981, 16-17). Iusence la Esperanta movado kun sia tradicia ideologio estis unu parto de la socia moderniĝo, laŭ kiu la tradiciaj elementoj de kulturo kaj socio iom post iom malaperos kaj estos anstataŭigataj per modernaj, raciaj elementoj. Laŭ tiu vidpunkto la opinio, ke la naciaj lingvoj iom post iom malaperu, estis neniel stranga aŭ malkonforma al la ĝeneralaj ideoj de la socio en la epoko, kiam la Esperanta idearo formiĝis.

Tamen ĝuste en la 1960-aj jaroj komenciĝis aktiviĝo de etnaj, politikaj movadoj en diversaj partoj de Okcidenta Eŭropo. La evoluo, kiun sociologoj nomas eĉ neatendita (Studlar & McAllister 1988, 48), estas relative vaste esplorita (Allardt 1979; Esman 1977; Smith 1981) kaj ofte teorie ligita kun la fortiĝo de post-materiismaj valoroj. En Britio la lokaj naciismaj partioj de Kimrio kaj Skotlando ekhavis reprezentiĝon en la Brita parlamento. La Parti Québécois en Kanado estis fondita en 1968 (Rawkins 1984, 86), la eŭska kaj kataluna naciismoj plu evoluis ĝuste en tiu tempo.

La evoluo de movadoj por etnaj rajtoj ankaŭ estas ligita kun la populariĝo de “unu-aferaĵ” movadoj (mediprotekta, kontraŭ nuklea energio, kontraŭ mortopuno, virinaj rajtoj ktp.), kiuj ne formas politikan partion kun plurflanka politika programo, sed provas influi al politikaj decidoj nur rilate unuopajn problemojn. Malantaŭ tiu evoluo evidentas la fakto, ke sociaj klasoj kaj klas-bazaj politikaj movadoj malfortiĝis. Krome la rapideco de sociaj ŝanĝoj kaj ekonomiaj problemoj estas menciitaj lige kun tiu evoluo (Rawkins 1984).

Ne estas mirinde, ke la fortiĝo de la politika aktivado de minoritataj etnoj havis sian efikon ankaŭ al la esperantistaro, kiu ja pli klare ol alia internacia movado okupiĝas ĝuste pri lingvaj aspektoj de homaj rajtoj.

Apud la socia evoluo en unuopaj ŝtatoj ŝanĝiĝis ankaŭ la internacia situacio. La internacia malŝtreĉiĝo kontribuis al plia kunlaboro preter naciaj kaj blokaj limoj. Al pli granda parto de civitanoj de Okcidenta Eŭropo internacia vojaĝado fariĝis ebla, kaj la bezono pri fremdaj lingvoj aŭ pri unu komuna lingvo fariĝis pli aktuala en praktika vivo. La lingvolernado en lernejoj aktiviĝis kaj komencis celi aktivan lingvouzon, kiu estis pli kaj pli bezonata en la ekonomia vivo kaj libertempo. Al tiu evoluo ligiĝas la fortiĝanta rolo de la angla lingvo kiel la ĉefa internacie uzata nacia lingvo.

La angla lingvo komencis ricevi pli da populareco kiel “la internacia lingvo” unue en okcidenta Eŭropo, poste ankaŭ en pluraj aliaj mondopartoj, kvankam restas daŭre regionoj, kie ĝi ne estas plej ofte parolata fremda lingvo (ekzemple en la franclingva kaj portugal-lingva Afriko kaj eksaj Sovetaj respublikoj).

Ankaŭ en la Esperanto-movado ne plu eblis fermi la okulojn al la internacia rolo de la angla. La tradicia pensado ja emfazis, ke la venko de unu nacia lingvo estas neebla, ĉar la naciaj lingvoj konkurencas inter si. Eblis flegi tiun kredon maksimume ĝis la komenco de la 1980-aj

jaroj, kvankam fido al tiu kredo komencis rompiĝi jam fine de la 1960-aj jaroj. En la 1980-aj jaroj jam komencis fariĝi klare, ke la angla ja venkis, se ne finvenkis. Do, ĝi almenaŭ fariĝis multe pli grava ol iu ajn alia internacie uzata nacia lingvo. Al tiu venko kontribuis unuavice malgrandaj eŭropaj ŝtatoj, kiuj komencis favori la anglan antaŭ aliaj internacie uzataj naciaj lingvoj, kaj ankaŭ Francio kaj Germanio, kie lernado de la angla superis la lernadon de iliaj reciprokaj lingvoj (Pietiläinen 2007).<sup>2</sup>

Tamen la kontraŭbatalado de lingva imperiismo kaj subteno al lingvaj minoritatoj ene de ŝtatoj ne estis la sola respondo al la ideologia sakstrato. Do, evidente la angla venkis ankaŭ en la mensoj de esperantistoj, kaj unu el la respondoj al tio estis kontraŭbatali ĝin, kaj kiel natura sekvo laŭ tio, ankaŭ kontraŭbatali aliajn formojn de lingva diskriminacio kaj superrego, ankaŭ ene de ŝtatoj. Unu alia solvo al ĝi aperis en la Manifesto de Raŭmo, manifesto, kies verkintoj kontraŭstaris ĝuste la negativan opinion pri la angla:

Ni kredas, ke: [...] la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la esperantistoj: finfine la angla rolas nur kiel *help*-lingvo, analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la E-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.(citita laŭ Tonkin 2006, 151)

Ne temis pri hegemonia uzo de naciaj lingvoj ĝenerale, aŭ pri la rilato al naciaj lingvoj, sed temis ĝuste pri la kontraŭstaro al negativa opinio pri la angla lingvo.

En Kultura Esperanta Festivalo en Helsinko en la jaro 2000, kiam okazis diskuto pri la Manifesto de Raŭmo, mi demandis pri la menciita afero Jouko Lindstedt, unu el verkintoj de la manifesto. Li respondis, ke ĝuste la negativa opinio de esperantistoj pri la angla lingvo, videbla i.a. en Universala Kongreso en Ateno, kie en ekskursiva aŭtobuso leviĝis laŭta protesto kontraŭ anglalingva ĉiĉerono, estis unu el la kialoj por reformi la tradician esperantistan ideologion.

Krome la manifesto emfazas la sendiskriminaciajn kontaktojn, kiujn Esperanto povas ebligi kaj tiel proksimas al plua evoluo direkte al la batalado kontraŭ diskriminacia lingvopolitiko kaj praktiko ĝenerale, kaj ne nur al batalado kontraŭ la angla lingvo. La Manifesto de Raŭmo ne aparte atentigas minoritatajn lingvojn, sed difinas “esperantistecon kvazaŭ la apartenon al mem elektita diaspora lingva minoritato.” (Tonkin 2006, 151/52). Iusence la Manifesto de Raŭmo kontraŭstaras la ideologian pozicion de la Deklaracio de Tyresö, kiu estas multe pli klara en sia difinado de ideologia pozicio. Kompare al Tyresö Raŭmo estas propre pli esperanta ol serĉas ligojn al la ekstera mondo.

La ideaj rilatoj inter la Manifesto de Raŭmo kaj etnistoj ne estas aparte klaraj. Tamen ambaŭ fontas el la sama idea krizo ene de la Esperanto-movado kaj subtenas unu la alian. Se ni akceptu esperantistecon kiel apartenon al memelektita diaspora lingva minoritato, kial ne partopreni, aŭ almenaŭ subteni, la batalon de aliaj lingvaj minoritatoj por siaj rajtoj. En nacilingva mondo la lingvaj movadoj kutime ne estas aparte emaj kunlabori trans lingvajn barojn, sed nur emfazas siajn proprajn rajtojn kaj batalas por ili, eventuale eĉ kontraŭ aliaj lingvaj movadoj. Ekzistas tamen kelkaj esceptoj kiel la kunlaboro de la germana kaj la ladina

---

<sup>2</sup> Pri la publika opinio pri la angla lingvo vidu Pietiläinen (2008).

lingvoj kaj iliaj movadoj en suda Tirolo, aŭ la subteno de Katalunio al siaj lingvaj minoritatoj (ekzemple al la okcitana lingvo en la Aran-valo).

Pri la idea reorientiĝo atestas ankaŭ la fakto, ke en la revuo Esperanto la temo “lingva problemo” fariĝas malpli ofta (se fidi al eventuale nefidinda kompilado de enhavlisto de la revuo), kaj pli kaj pli ofte temas pri rajtoj de minoritataj lingvoj. La revuo raportis ekzemple pri tio, ke la brita parlamento rifuzis leĝproponon “per kiu la uzo de la gaela lingvo estas protektata kaj akcelata” (Esperanto, marto 1981, 45) kaj pri tio, ke la manko de hispanlingva edukado en Teksaso estas lezo al la garantioj pri egala protektado (Esperanto, aprilo 1981, 76). Sed ĝenerale la raportoj pri la lingva situacio en la ekstera mondo sen rilato al Esperanto komencis malaperi el la revuo. Por tiaj artikoloj ja aperis novaj forumoj, unuavice la revuoj *Monato* kaj *Etnismo*.

## 5 Por nova monda lingva ordo

Apud la subteno de minoritataj lingvoj aperis ankaŭ alia diferenco al la tradicia linio de UEA. La asocio subtenis kaj partoprenis en la agado por la Nova Monda Informa kaj Komunikacia Ordo. La ideo, kiu ekestis lige kun la Nova Monda Ekonomia Ordo, celis egaligi internaciajn komunikajn fluojn, unuavice inter evoluantaj kaj evoluantaj landoj, sed poste ankaŭ inter divers-sistemaj landoj kaj inter grandaj kaj malgrandaj landoj.

La celo estis limigi la superregon de la usona (aŭ alia okcidenta) amaskulturo kaj igi unuflankajn komunik-fluojn (el centro al periferio) duflankaj. Internaciaj esploroj montris malegalecon kaj unuflankecon de komunikaj fluoj, kaj estis proponitaj solvoj por ŝanĝi tion. Inter la iniciatoj estis i.a. regionaj kunlaboroj de naciaj novaĝ-agentejoj kaj kunlaboro de novaĝ-agentejoj de nealiĝintaj ŝtatoj (Sreberny-Mohammadi k.a. 1985).

Unesko starigis laborgrupon por la studado de komunikaj problemoj (Komisiono de MacBride), kiu prezentis sian raporton en 1980 (MacBride 1980). Ankaŭ socialismaj ŝtatoj komprenis la valoron, kiun reformado de internacia komunika sistemo povus porti al ili. Tiuj ŝtatoj ne estis plene fermitaj, ili fakte ricevis pli da kulturaj produktoj kaj novaĝoj el okcidento ol la okcidento ricevis el tiuj ŝtatoj (Nordenstreng & Varis 1974). Ŝanĝi tion povus montriĝi utila por socialismaj ŝtatoj, kiuj eventuale povus eksporti pli da kulturaj produktoj, se la okcidenta superreĝo rompiĝus. En komisiono de MacBride, ĝuste UEA estis tiu organizo, kiu levis la lingvan demandon, “insistente, ke oni ne povas studi la internacian komunikadon sen atento al lingvaj demandoj” (Tonkin 2006, 82).

Okcidentaj kritikantoj opiniis, ke la Nova Ordo celas kontrolon de eksterlandaj ĵurnalistoj fare de ŝtatoj. Sed tion Unesko fakte neniam proponis, sed jes proponis, ke necesus uzi liberecon de gazetaro per respondeca maniero (Nordenstreng 1999, 258-259).

En la Esperanto-movado la ideoj ĉirkaŭ NMIKO realiĝis ankaŭ en la fondo de la revuo *Monato* (la unua numero aperis en januaro 1980), kies principo estas, ke la artikoloj estu verkataj de persono, kiu loĝas en la regiono, pri kiu la artikolo temas. Temas pri principo, kiun poste ankaŭ internaciaj novaĝ-agentejoj kaj nacilingvaj gazetoj parte aplikis, i.a. en la araba mondo, kie labori por lokano estas pli praktike kaj sekure ol por okcidentano.

La Esperanto-movado, unuavice CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj) kaj la Nov-Jorka oficejo de UEA, traktis la lingvajn aspektojn de neegaleca komunikado en konferenco en Nov-Jorko, okazinta en decembro 1982. La konferenco atentigis i.a. pri la manko de instruado de fremdaj lingvoj en Usono (Esperanto, januaro 1983, 6-7). Tiutempe krom la Esperanto-movado malmultaj organizoj atentigis pri la lingva malegaleco de internacia komunikado. La monda komunika jaro en 1983 estis unu el iniciatoj plibonigi la komunikan situacion en la mondo, sed la UN-rezolucio pri ĝi unuavice atentigis pri teknologio kaj ne pri la homa kaj lingva flankoj de komunikado. La esperantista kontribuo al tiu jaro kulminis en la Budapeŝta UK, kiun ankaŭ partoprenis la ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio Richard E. Butler. En sia malferma parolado Humphrey Tonkin atentigis, ke la lingvaj celoj de la Esperanto-movado havas du flankojn: “Unuflanke ni celas tutmondan lingvan komunikadon per unusola lingvo. Aliflanke ni celas konservi la malgrandajn lingvojn kontraŭ la superrego de la grandaj naciaj lingvoj.” Laŭ li la Esperanto-movado strebas al egaleco inter la homoj kaj kontraŭas malegalecon, maljustecon kaj mankon de kultura diverseco (Esperanto, septembro 1983, 147).

Tonkin rakontas pri la agado de UEA en Unesko kaj atentigas ke ĉe Unesko, “fariĝis ĉiam pli varma la debato pri komunikado”. La lingvan problemon, la mankon de komunikado pro manko de komuna lingvo en UN oni iasence solvadis per la kreskanta uzado de la angla lingvo, sed “interkomprenante, ili tion faris en situacio esence malegala.” (Tonkin 2001, 291).

Kvankam en prilingvaj diskutoj ĉirkaŭ la Monda komunika jaro temis unuavice pri interŝtataj lingvaj rilatoj, ne estas granda paŝo komenci kontraŭstari la neegalecon ankaŭ sur nacia nivelo.

Tiuj esperantistoj, kiuj unuavice emfazas la duan celon de la Esperanto-movado, emas ne anstataŭigi la nuna rolon de la angla per Esperanto, sed reformi la mondan lingvan ordon pli draste kaj ne enkonduki Esperanton kiel novan superregantan lingvon, sed egaligi la potencrilatojn inter ĉiuj lingvoj.

Ne plu temis pri forigo de “la lingva problemo” laŭ la stilo de Ivo Lapenna, sed forigo de lingva malegaleco kaj kontraŭstaro al la superego de la grandaj naciaj lingvoj. Necesus reformi la tutan sistemon de lingva komunikado, doni pli da atento al minoritataj lingvoj kaj al diskriminacio sur ĉiu nivelo. Esperanto povintus venki nur en kondiĉoj, en kiuj la tuta lingva situacio de la mondo estus reformita.

Ankaŭ la Vankuvera UK en 1984 daŭrigis la okupiĝon pri lingvaj minoritatoj. La kongresa temo estis “Lingvaj minoritatoj: ĉu nur nacia fenomeno?”

En la kongresa rezolucio la vankuvera UK difinis la novtipan lingvan politikon de UEA kaj konstatis “ke la homaro havas devon labori por konservi la diversecon de lingvoj kaj kulturoj, samtempe ebligante socian komunikadon kaj ekonomian kaj socian evoluon”. Krome la rezolucio emfazas, eble la unuan fojon en tiom klara formo, ke Esperanto “montris sian kapablon ŝirmi la malgrandajn lingvojn kaj meti ĉiun internacian komunikadon sur egalan nivelon”. (revuo Esperanto, septembro 1984, 142) Demokratiigo de lingvo-uzo estis la ĉefa mesaĝo de tiu rezolucio.

La vankuvera kongresa rezolucio ne restis la sola en sia speco, sed la evoluo por redifini la rolon de naciaj lingvoj apud Esperanto daŭris. La kristaliĝo de tiu idea fluo okazis en la Manifesto de Prago, kiu klare difinas la lokon de la Esperanta movado ĉe la flanko de

defendantoj de plurlingvismo kaj minoritataj lingvoj. Ne plu temis pri la altegaj kostoj de plurlingveco aŭ pri malbonaj rezultoj de lingvo-instruado (kiam temas pri naciaj lingvoj), sed pri la bezono konservi plurlingvecon kaj veran egalecon inter ĉiuj lingvoj.

La Manifesto de Prago kritikas naciajn registarojn pro tio, ke ili “emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo”, kvankam ĝuste tio ne estas aparte malproksima el la malnova esperantista, sennaciece inspirita pensado. Male la manifesto difinas la lokon de la Esperanto-komunumo en tute alia maniero. Por ĝi “la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco”. (citita laŭ Tonkin 2006, 154). Mi dubas, ke Zamenhof subskribus tion.

Aparte kun la redaktoriĝo de Mark Fettes en 1987 la revuo Esperanto komencis doni pli da atento al la ĉefa avantaĝo de Esperanto kompare al la angla, nome ĝia idealisma flanko pri neŭtraleco. Laŭ vortoj de Tonkin cititaj de James Fallows en *The Atlantic Monthly*

“Nun neniu povas pretendi, ke Esperanto konkuros kun la angla. Sed mi estas pli idealisma nun, Esperanto ebligas specon de komunikado, kiun la angla malfaciligas” (Esperanto, februaro 1987, 23). Tonkin plu traktas tiun temon en artikolo, kie li konstatas, ke “tie kie lingva egaleco estas celo de la internacia interago, tamen Esperanto havas klarajn avantaĝojn” (Tonkin 1987, 121).

Iusence la kulmino kaj por la Nova Monda Informa kaj Komunika Ordo kaj por Esperanto en Unesko estis la ĝenerala konferenco de Unesko 1985 en Sofio. La ideoj de NMIKO ricevis fortan kritikon flanke de okcidentaj ŝtatoj, kiu provis haltigi ĉiujn diskutojn kaj studojn rilate al NMIKO, sed finfine kompromiso estis trovita (Usono jam malaliĝis el Unesko en 1984), laŭ kiu Unesko daŭrigas “kolektadon kaj analizon de informoj, kiuj temas pri evoluigado de koncepto de nova monda informa kaj komunika ordo, kiun ĝi vidas kiel evoluantan kaj daŭran procezon” (citita laŭ Nordensteng 1999, 260; esperanta traduko de la aŭtoro).

Pri Esperanto estis unuanime akceptita nova rezolucio. En la Sofia rezolucio Unesko invitas la ŝtatojn-membrojn “instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado” kaj “pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn” (citita laŭ Tonkin 2001, 295-296).

Tamen la monda politika evoluo turnis sin kontraŭ la Nova Internacia Komunika kaj Informa Ordo kaj post du rondtablaj konferencoj de UN kaj Unesko pri ĝi (1983 kaj 1986) la tria konferenco neniam okazis, ĉar la politiko de Unesko rilate reformojn de monda komunikado ŝanĝiĝis kun la ŝanĝo de la Ĝenerala Sekretario M’Bow al Federico Mayor en 1987. En la 1990-aj jaroj la koncepto ne plu estis eĉ menciita en Unesko, kaj diskutoj pri monda ordo fariĝis nur akademias (Nordensteng 1999, 262-264). Tonkin rezonas simile: “La okcidentaj ŝtatoj komencis la sisteman malmunton de debatostrukturoj ĉirkaŭ komunikado kaj redirektis Uneskon al malpli disdividaj temoj (kaj temoj malpli fekundaj por Esperanto)” (Tonkin 2001, 298).

En la Esperanta movado la ideoj pri nova internacia lingva ordo tamen restis vivaj kaj daŭre evoluis. La ideoj pri sendiskriminacia komunikado kaj lingva egaleco ricevis ankaŭ atenton fare de ne-esperantistaj fakuloj pri lingvopolitiko. La Nitobe-simpozioj en 1996, 1999, 2004, 2005 kaj 2007 daŭrigis tiun laboron kaj sukcesis altiri la intereson de ne-esperantistaj fakuloj. La Pekina Nitobe-simpozio en 2004 eĉ havis la titolon “Al nova internacia lingva ordo”, kiu

laŭ Lee Chong-Yeong enhavu protektadon de kulturaj kaj lingvaj diversecoj de malsamaj nacioj, protektadon kaj disvastigadon de homaj rajtoj de lingve malfortaj minoritatoj kaj facilan komunikadon inter lingve malsamaj nacioj (Lee 2004, 89).

La nova lingva ideologio de la Esperanto-movado pli emfazas la lokon de Esperanto kiel internacia aŭ eble pli ĝuste inter-genta lingvo. Kiel emfasis Mark Fettes en sia fama eseo la pozicio de Esperanto dependas ankaŭ de tio, ke “pli egaleca distribuo de potenco rekte favoras la uzon de lingvo apartenanta al neniu aparta grupo” (Fettes 1991, 12). Ja pure racie, la rolo de neŭtrala internacia lingvo estas pli forta ju pli da naciaj lingvoj ekzistas kaj ju pli egalaj ili estas inter si. Tiam la internacia lingvo ne devus konkurenci kun iom pli fortaj aŭ superfortaj naciaj lingvoj, sed havus saman internacian signifon por ĉiu popolo kaj homo. Tia situacio certe estas ideala, kaj eĉ la forta disvastiĝo de la internacia lingvo ne forigus la utilo-diferencojn aŭ prestiĝo-diferencojn inter naciaj lingvoj.

Iom aplikante la iaman diron pri la rilato al kapitalismo kaj pri la tipo de socialistoj (Andersson 1988), eblus diri ke, “diru al mi, kion vi opinias pri naciaj lingvoj, aŭ eĉ nur pri la angla lingvo, kaj mi diros al vi kia esperantisto vi estas”.

*Unu grupo* vidas la ekziston de pluraj naciaj lingvoj kaj plurlingvan praktikon (eĉ plurlingvecon ene de naciaj ŝtatoj) kiel negativan fenomenon, kiu kaŭzas kostojn por impostpagantoj kaj utilas nur al tiuj, kies lingvo estas elektita kiel oficiala. Por ili la kresko de fortaj naciaj lingvoj kaj malapero de minoritataj kaj malpli grandaj lingvoj ofertas unu paŝon al la direkto de tutmonda lingvo, Esperanto. Do, ne necesas multe okupiĝi pri konservado de malgrandaj naciaj lingvoj, kiuj malgraŭ ĉio estas destinitaj al malapero, kio ne kaŭzus iun malutilon por la homaro.

*Dua grupo* vidas en la kreskanta rolo de la angla lingvo rektan minacon al Esperanto. Por ili la angla lingvo ne ofertas ion bonan, sed ĝia lernado kaj internacia rolo nur portas la belan tagon de la fina venko malpli proksimen.

La *tria grupo* vidas la nuntempan rolon de la angla lingvo kiel pozitivan fenomenon, per la angla lingvo eblas realigi multon el tio, por kio Esperanto estis planita, tamen la funkciado de la angla lingvo estas malperfekta pro la nacia rolo de la angla kaj Esperanto povus plenumi tiun rolon multe pli bone. Iel la nuna rolo de la angla kvazaŭ preparas la mondon por unu neŭtrala internacia lingvo. Pri tio verkis inter alie Mikko Mäkitalo, la ĉefredaktoro de la finnlanda revuo Esperantolehti, kiu asertis ke

la nuna internacia stato de la angla povos eĉ pretigi la vojon al ĝenerala uzo de Esperanto. Nun homoj ja spertas en granda parto de la mondo, ke estas simpla afero, ke anoj de diversaj nacioj povas en siaj renkontiĝoj interkompreni per la angla. Sekva fazo tute bone povus esti, ke la homaro spertas, aŭ antaŭvidas, malaperon de la angla el tia rolo – kaj ekkomprenas, ke povos esti ankoraŭ pli simple!” (Esperantolehti 6/2006, 5).

Historie la grandeco de tiuj grupoj variis. La unua certe estis pli forta en pli frua epoko, dum la dua kaj la tria komencis aperi nur post la “venko” de la angla, kvankam similaj opinioj povis ekzisti pli frue rilate al la franca aŭ, eĉ al la germana aŭ al la rusa.

## 6 Konkludo

La ĉefa ideo fluo en la Esperanto-movado komencis ekde la 1960-aj jaroj malpli forte atenti pri “la lingvo problemo” sur interŝtata nivelo kaj turnis sin pli al “lingvaj problemoj”, do, ne nur unu sed pluraj kaj diverstipaj. La ideologia ŝanĝo estis necesa, ĉar ne plu eblis blufi, ke unu el naciaj lingvoj ne povas venki super la aliaj. Krome la tradician lingvan problemon, la mankon de interkompreno inter homoj, la angla komencis jam solvi, se ne perfekte aŭ kontentige, almenaŭ elemente kaj kun mankoj, sed tamen solvis. Respondoj al la nova rolo de la angla estis diversaj, sed parencaj unu al alia. La plej frua el tiuj respondoj estis kontraŭbatali la lingvan imperiismon en internacia nivelo kaj kontraŭbatali la anglan. El tio fontis du evoluoj: unu, kiu emfazis kontraŭstaron al lingva imperiismo ĝenerale, ankaŭ rilate al minoritatoj ene de ŝtatoj, kaj la dua, kiu deklaris tiun batalon nenecesa. La angla tamen ne plu aperis kiel la sola malamiko, sed evoluis la kompreno, ke la lingva problemo, aŭ la lingvaj problemoj, estas pli kompleksaj ol nura elekto de lingvo por interŝtataj kontaktoj kaj ke lingva malegaleco troveblas sur plej diversaj niveloj.

La ideologia ŝanĝiĝo rezultis ankaŭ proksimiĝon al etnaj, unuavice lingvaj, minoritatoj ene de ŝtatoj. Lingva plureco ne plu aperis kiel kialo por la lingva problemo eventuale forigebla, aŭ eĉ foriginda per Esperanto. Plureco de lingvoj komencis aperi kiel dezirinda stato kaj ne plu kiel forigenda problemo. Malantaŭ tiu ideologia ŝanĝiĝo estis la “malvenko” de Esperanto en la batalo kontraŭ la angla kiel internacia lingvo. En la 1960-aj jaroj, aŭ pli frue, tiu batalo aspektis ebla kaj eventuale eĉ venkebla, almenaŭ por esperantistoj, plej parte pro tio, ke diversaj naciaj lingvoj estis uzataj internaciskale pli vaste en siaj respektivaj influregionoj. En la 1980-aj jaroj la batalo inter Esperanto kaj la angla ne plu estis inter la realaj alternativoj, eĉ inter esperantistoj. Necesis elpensi alternativan rolon por Esperanto. Unu alternativon, iom ekstreman kaj esence komunum-celan, ofertis la Manifesto de Raŭmo, dum la movada flanko de Esperanto bezonis alian solvon, kiun ĝi trovis en nova aliro al lingva plureco. Ĉu Esperanto entute reale povus oferti sian alternativon al defendo de lingvaj minoritatoj, almenaŭ por momento restos inter utopioj, sed same utopio estis la “fina venko” en sia tradicia formo.

La ideologia ŝanĝiĝo videblas inter alia en la rilato al plurlingveco de Eŭropa Unio. La pli maljuna generacio emfazas altegajn kostojn de plurlingveco, problemojn en tradukado kaj interpretado kaj proponas uzon de Esperanto por malaltigi tiujn kostojn kaj forigi problemojn. La pli juna generacio emas atentigi pri la egaleco de ĉiuj lingvoj (kiu ankaŭ estas deklarata celo de EU) kaj montri, ke en praktiko la pli fortaj lingvoj subpremas la malpli fortajn kaj proponas Esperanton por pli egaligi la lingvo-uzon inter fortaj kaj malplifortaj lingvoj, sen la ideo forigi la multlingvecon.

Kreskas ankaŭ kompreno pri tio, ke evidente la uzo de Esperanto ne forigus tradukerarojn kaj problemojn en komunikado. Esperanto aperas kiel eventuala, provinda ideo, kaj ne kiel jam testita preta solvo, kion eventuale eblus subkompreni el la volo rapide enkonduki ĝin.

En la praktiko la ideo de multlingveco eventuale povus fari Esperanton malutila, almenaŭ en iuj funkcioj. Ekzemple por kiu utilis aldono de Esperanto al 30- aŭ 40-lingva instrukciaro de iu maŝino aŭ varo, kiam preskaŭ ĉiu aĉetanto povas trovi inter tiuj lingvoj sian gepatran? Tamen ekzistas ankoraŭ multe da situacioj, kie plurlingveco ne estas same facile utiligebla.

La nova prilingva ideologio de Esperanto (aŭ de UEA) estis reago al la ŝanĝiĝanta mondo kaj al eblecoj kaj utopioj, kiuj estas iel realaj por la Esperanto-movado. Ĝi ankaŭ proksimigis Esperanton al la ekstera mondo, kie la problemo de lingva diskriminacio kaj malapero de lingvoj ricevis multe pli da atento ol nur antaŭ kelkaj jardekoj.

## Bibliografio

- Allardt, Erik & Christian Starck (1981): *Vähemmistö, kieli ja yhteiskunta*. Helsinki: WSOY.
- Allardt, Erik (1979): *Implications of the Ethnic Revival in Modern, Industrialized Society. A Comparative Study of the Linguistic Minorities in Western Europe*. Helsinki: Societas Scientiarum Fennica (Commentationes Scientiarum Socialium 12).
- Andersson, Jan Otto (1988): *Vänsterframtid. Nationalekonomiska studier av fordismens kris och morgondagens alternativ*. Helsingfors: Folkets Bildningsförbund.
- Arkivo de Esperanto-Klubo de Jyväskylä*. Konservata en Regiona arkivo de Meza Finnlando en Jyväskylä.
- DucGoninaz, Michel (1985): “La socia statuso de Esperanto: tri historiaj teorioj (Zamenhof, Lanti, Lapenna) konfronte al la nuna realo”. En: Biedulski, Czesław (Red.): *Strategiaj demandoj de la Esperanto-Komunumo. 1-a Internacia Simpozio, Varsovio 1984.04.24-28*. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, p. 34-41.
- Esman, Milton J. (1977 ed.): *Ethnic Conflict in the Western World*. Ithaca & London: Cornell University Press.
- Fettes, Mark (1991): *Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo*. Rotterdam: UEA. Esperanto-Dokumento 27 E.
- Lanti, E. (1970): *Manifesto de la Sennaciistoj kaj Dokumentoj pri Sennaciismo*. Paris: SAT. Tria eldono.
- Lapenna, Ivo (1974): “La lingva problemo en internaciaj rilatoj”. En: Lapenna, Ivo; Ulrich Lins, Tazio Carlevaro (Red.): *Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 3-27.
- Lee, Chong-Yeong (2004): “Al nova internacia lingva ordo”. En: Lee, Chong-Yeong & Liu, Haitao (Red.): *Al nova internacia lingva ordo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 85-91.
- MacBride, Sean k.a (1980): *Many voices, one world: Report by the International Commission for the Study of Communication Problems*. Paris: Unesco.
- Nordenstreng, Kaarle (1999): “The Context: Great Media Debate”. En: Vincent, Richard C., Nordenstreng, Kaarle & Traber, Michael (ed.): *Towards Equity in Global Communication, MacBride Update*. Cresskill, New Jersey: Hampton Press, p. 235-268.
- Tapio Varis (1974): *Television Traffic: A One-Way Street? A Survey and Analysis of the International Flow of Television Programme Material*. Reports and papers on mass communication No. 70. Paris: Unesco.
- Pietiläinen, Jukka (2007): “Evoluo de lingvoscio en la Eŭropa Unio”. En: *Language Problems and Language Planning* 31:3, p. 257-279.

- (2008): “Publika opinio pri utilaj lingvoj en Eŭropo”. En: Vergara, José Antonio (Red.): *Internacia Kongresa Universitato. 61a sesio*. Roterdamo, Nederlando 19-26 julio 2008. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, p. 40-55.
- Privat, Edmond (1927): *Historio de la lingvo Esperanto. La Movado 1900-1927*. Hago: Internacia Esperanto-Instituto.
- Rawkins, Phillip (1984): “The Role of the State in the transformation of the nationalist movements of the 1960s: comparing Wales and Quebec”. En: *Ethnic and Racial Studies* 7:1, p. 86-105.
- Smith, Anthony D. (1981): *The Ethnic Revival in the modern world*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Sreberny-Mohammadi, Annabelle, Kaarle Nordenstreng, Robert Stevenson, Frank Okwu Ugboajah (1985): *Foreign news in the media: international reporting in 29 countries*. Reports and papers on mass communication No. 93. Paris: Unesco.
- Studlar, Donley T. & McAllister, Ian (1988): “Nationalism in Scotland and Wales: a post-industrial phenomenon?” En: *Ethnic and Racial Studies* 11:1, p. 48-62.
- Tonkin, Humphrey (1987): “Esperanto kaj la angla lingvo: Du lingvoj kun diversaj celoj”. En: *Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo. Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto*. Tokyo: Japania Esperanto-Instituto, p. 117-122.
- (2001): “De Montevideo al Sofio. Esperanto antaŭ Unesko kaj Unesko antaŭ Esperanto”. En: Lee, Chong-Yeong (Red.): *Esperanto en la 21a Jarcento*. Seoul: Korea Esperanto-Asocio, p. 277-301.
- (2006): *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam:UEA.
- Zamenhof, L.L. (2006): *Mi estas homo. Originalaj verkoj de d-ro L.-L. Zamenhof*. Redaktis Aleksander Korĵenkov. Kaliningrad: Sezonoj.

### **Jukka Pietiläinen**

Nask. 1966. Doktoro pri sociaj sciencoj. Laboras kiel esploristo pri ruslandaj socio kaj amaskomunikiloj en la Universitato de Helsinko; docento pri ĵurnalistiko en la Universitato de Tampere (ekde 2008). Prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, 1994-1998.